

# Cirkulero de Midi-Pyrénées

januaro 2010

## ESPÉRANTO MIDI-PYRÉNÉES

1 place des Avions, 31400 Toulouse

T. 05 61 25 55 77, [sudo.pireneoj@free.fr](mailto:sudo.pireneoj@free.fr)

<http://sudo.pireneoj.free.fr>

voir aussi

<http://esperanto.toulouse.free.fr>



Monsieur Tarek et FaMo pendant la Zam-Festo

### Enhavo :

Zamenhoffesto en Tuluzo	1
Jarkunveno (protokolo)	2
Semajnfino Kanto Ĝenerala	3
Festival mondial de la Terre	3
Radios locales: Foix	4
Chez les Verts	4
Cours d'espéranto en Midi-pyr	4
Mesaĝo por internacia virina tago	5
Skizo pri la Esperanto-movado	6
Apprendre l'espéranto en mars	7
Conférence-débat sur le Japon	8

## Jarkunveno de nia asocio okazis la 20-an de decembro 2010

okaze de la Zamenhof-festo, en Tuluzo

### Ĉeestantoj :

Membroj : Jeanne-Marie Cash (31), Gilbert Darrieux (65), Vincent Descargues (81), Marion Quenut (31), Françoise Carrieu (65) Henri Graven (64)

Forestas kun motivo : Xavier Dewidehem (UFE), René Ballaguy (09), André Andrieu (12)

### Organizo de la kunsido :

Prezidas Jeannette. Protokolas Marion.

### Agadraporto kaj Financa raporto:

La prezidantino, Jeannette Cash, prezentas la raporton. Ĝi estas aprobata unuvoĉe. Jeannette, kiu agas ankaŭ kiel kasistino, prezentas tiun raporton, kiu estas ankaŭ aprobata unuvoĉe. La jara kalkulo montras profiton je 274€ ; la disponebla mono je la 15a de nov. 2008 en kuranta kaj ŝpar-kontoj estas 2199€.

### Projektoj por la venonta jaro :

Kunlegado de raporto de la ĝenerala kunsido 2009.

Projektoj pri kiuj ni parolis, kelkaj okazis, daŭris, komenciĝis, kiel ekzemple kadre de la projekto Canto General en esperanto, la Koruso (12 membroj el kiuj nur 4 tuluzanoj). Jam kvarfoje ili renkontiĝis en Arrout kaj Tuluzo. La koruso de la regiono koncertos kun la aliaj grupoj en Saint-Brieux (4an de Aprilo), la 23an/24an de majo en Kaiserslautern (Germanujo) okaze de kongreso franc-germana, kaj en Le Mans la 13an de junio.

Projektoj kiuj ne okazis: Ne okazis renkontiĝo kiel en 2008 en Villeneuve/Lot.

La retejo estas kreita sed krom Tuluzo, neniuj plenigis paĝojn pri aliaj departamentoj. Estus

bone almenaŭ aldoni kontakton el ĉiu urbo. Vincent proponas sin por zorgi pri la retejo, por ke lokaj asocioj plenigu aŭ sendu informojn. Li kontaktos Séverin por ke li klarigu la funkcion de la retejo. < <http://sudo.pireneoj.free.fr/>.>

Henri proponas ke la afiŝo por Zamfesto estu afiŝitaj en diversaj publikaj lokoj de la regiono. Ni ja povas konsili al ĉiuj komuniki pri Zamfesto ne nur inter esperantistoj.

Vincent proponas partopreni je asocia forumo en Albi (materialoj, ekspozici-paneloj). Estis proponita ke li kontaktu la lokan esperantistan asocion (kiu ofertas kursojn en Albi).

Gilbert ankaŭ klopodos partopreni la asocian forumon en Tarbes.

Vincent demandas ĉu ni havas ligojn kun okcitanaj medioj kaj universitataj medioj. Pri okcitanaj, ni havas en Tuluzo, kelkaj agadas kaj por esperanto kaj por la okcitana. Pri universitato mankas ligoj de kelkaj jaroj inter la profesoroj.

Marion informas ke FESTO okazos en Tuluzo, de la 13a ĝis la 20a de aŭgusto. Estis anoncita en retejo de JEFO sed ankoraŭ mankas detaloj. Verŝajne EKC kaj kelkaj tuluzanoj iel kunlaboros.

Marion informas ke pedagogian trejnadon verŝajne organizos EKC printempe, la federacio povos helpi por komuniki kaj venigi instruistojn, kaj instruemulojn de la regiono.

Jeannette proponas ke la federacio monhelpu pri vojaĝkostoj kelkajn kantistojn (de la koruso), kiuj aliĝis la projekton en Tuluzo kaj deziras partopreni koncertojn. Tiu helpo ne superos la lastjarajn profitojn (ĉirkaŭ 250€). Ĉiuj aprobas la ideon. Gilbert demandas ĉu la regiono iel profitos el la projekto. Jeannette respondas ke ne eblas koncerti malpli ol kvindeke sed ke kiel eble plej frue ni povos venigi la tutan koruson en la regionon.

Jeannette memorigas ke kutime la asocio monhelpas la reprezentanton de la fede kiu partoprenas ufe-komitatkunvenojn pagante la ceteron de la kostoj ne kompensitaj de UFE.

Aliaj eblaj elspezoj: pli da materialo por prezenti esperanton, kunuzota de lokaj asocioj aŭ membroj por pli bone informi (budoj, prezentoj...)

Marion proponas ke la sendo de la Krokodil' (bulteno de Esperanto Kultur Centro de Tuluzo) kaj la Cirkulero de Midi-Pyrénées okazu samtempe, kaj ke la enhavoj kongruu. Tiel ni gajnos tempon kaj informos pli bone kaj pli ofte (ĉiujn 2 monatojn)

Sekvis diskuto pri organizo de UFE kaj komitatkunvenoj, kiel regiona strukturo, la federacio Midi-Pyrénées sendas unu komitatanon (kiu komisiono? , kiuj voĉdonoj?). Jeannette esperas ke UFE sendos pli frue tagordon, tiel ke ni povos inter komitatanoj de nia asocio diskuti pri projektoj kaj proponoj kaj doni klaran komision al reprezentanto.

En la venonta cirkulero (komence de Januaro), Marion proponas ke oni klarigu la funkcion de UFE (Esperanto France) kaj la ligiloj inter ĝi kaj lokaj asocioj, kies membroj ofte scias nenion pri ili. Jeannette zorgos pri tio.

### **Renovigo de la komitato kaj estraro:**

Por Jeanne-Marie Cash, André Andrieu, Samia Harir: trijara mandato finiĝas.

Jeanne-Marie Cash kaj André Andrieu rekandidatiĝas (ne por prezidanteco).

Gilbert Darrieux, Bernard Legeay kaj René Ballaguy elektitaj en 2007 restas.

Marion kandidatiĝas; ĉiuj kandidatoj (re)elektiĝis.

**Oni proponis Marion kiel prezidanton, Jeannette kiel sekretarion; Andrieu konsentas resti vic-prezidanto. Tiu disdivido devas esti konfirmata de reta voĉdono de la 6 komitatanoj.**

Marion

## Semajfino pri la Kanto Ĝenerala

La 21-22-an de novembro, grupo de dek korusanoj kunvenis en Tuluzo, el la tuta regiono por provkanti, la unuan fojon sub gvido de Franjo Lévèque, korusestrino de Interkant', la famajn poemojn de Pablo Neruda laŭ muziko de Mikis Theodorakis.

Sabaton ni kantis ĉe Jacques Caubel, kaj dimanĉon en Maison de Quartier.

Estis tre agrable fine kunmeti niajn voĉojn por kanti tiujn melodiojn lernatajn de du monatoj, kaj aŭskulti kiel ili sonoras. Ni estis kuraĝigitaj de Franjo, kies entuziasmo estas ja komunikiva ... Ŝi gratulis nin - eble indulge –, ĉar ni sukcesis en mallonga daŭro lerni la novan kanton « Liberigantoj », kiun ŝi malkovrigis al ni.

Nia venonta provkantado okazos sen Franjo, la dimanĉon 24-an de januaro.

Kaj du novaj korusaninoj, el Gironde, promesis partopreni nian lastan semajnfanan provkantadon, kiu okazos la 27-28-an de februaro, kun Franjo.

Jen la koncertoj, de **Interkant'** (50 ĥoruloj plus muzikistoj) :

- 1) la 4-an de aprilo en Hillion (près de St-Brieuc), okaze de la kongreso de SAT-amikaro <<http://www.esperanto-sat.info/rubrique130.html>>
- 2) la 22-23 de majo en Kaiserslautern (Germanujo), okaze de la Franc-germana Esperanto-Kongreso <<http://esperanto-france.org/spip.php?article108>>
- 3) la 13-an de junio en Le Mans (Eglise St Lazare).

Jeannette

(foto G. Darrieux)



**TERRALLIANCE MIDI PYRENEES** organise un

## **Festival Mondial de la Terre 2010**

Lors des deux années précédentes, l'espéranto était présent lors des manifestations, à Toulouse et en Hautes Pyrénées. Une première réunion aura lieu à Toulouse le 16 janvier.

[www.festivaldelaterremp.org](http://www.festivaldelaterremp.org)

**(Si vous y participez, informez-nous).**

Radios locales :

## Foix : Une nouvelle émission sur l'espéranto

Après **Toulouse** (Radio Canal Sud, 92.2, <http://www.canalsud.net/> lundi 20-21 h) et à **Villefranche de Rouergue** (12), où des émissions hebdomadaires sont assurées par des espérantistes, c'est au tour de **Fo**<http://www.radio-transparence.org/emissions.php?detail=110ix> de se lancer.

**Une nouvelle émission** de radio sur l'espéranto a lieu depuis le 29 octobre 2009, tous les jeudis, de 16 à 17 h. à Radio Transparence 93,7.

Possibilité d'écouter par Internet : <http://www.radio-transparence.org/>. Présentation de l'émission sur : .

(René Ballaguy <[rene-ballaguy@wanadoo.fr](mailto:rene-ballaguy@wanadoo.fr)> 05 61 03 86 83 )

## Cours d'espéranto en Midi pyrénées

Ariège :

- **Mirepoix**: lundi 14 H 30 (Espace d'Initiatives Sociales et Economique)
- **Laroque d'Olmes** : mardi 10 H 00 (Maison des Jeunes et de la Culture Guy Môquet)
- **Pamiers** : mardi 16 H 00 à (Maison des Jeunes et de la Culture)
- **Foix** : vendredi 17 H – 20h.30 à (Foyer Leo Lagrange)
- **Verniolle** : un samedi sur deux 14 h.(débutants) et à 15 h, à l'Ancienne Mairie l'AG du C.E.E.A. A eu lieu le sam 26 novembre 2009.

Aveyron :

- **Villeneuve d'Aveyron** (Vilanovo) : kvar lernantoj en perfektiga kurso (A. Andrieu)

Haute-Garonne

- **Toulouse** : Voir : <http://esperanto.toulouse.free.fr/> et <http://lakrokodil.wordpress.com/>  
Cours express (débutant) les mardis soirs.  
Cours de parole les mercredis 20.30 (Maison de quartier Ranguéil)  
Cours débutants (ass; Cheminots pour l'espéranto)
- **St-Orens** : cours deux niveaux lundi (ass. Cheminots pour l'espéranto)

Tarn :

- **Albi** : deux cours : le lundi soir pour les débutants, jeudi pour les anciens (Claudine Lentz)
- **Lavaur** : une dizaine de personnes se réunissent les mercredis autour de Daniel Maynau

## Chez les Verts (Aquitaine)

Ils l'ont fait ! L'appel d'Europe Ecologie Aquitaine "Gagnons l'Aquitaine à l'écologie" a été traduit en espéranto sous la forme "Ekologio konkeru Akvitanion", comme il avait déjà été traduit en occitan et en basque. La page se trouve dans le site web officiel d'Europe Ecologie Aquitaine à l'adresse <http://aquitaine.regions-europe-ecologie.fr/signez-l-appel/2066-ekologio-konkeru-akvitanion/>

**Claude LABETAA** [labetaa.claude@wanadoo.fr](mailto:labetaa.claude@wanadoo.fr)

**Les Toulousains se souviennent de cette jeune retraitée japonaise, qui les a visité au printemps dernier...**

**Skribas Osioka Taeko el urbo Hiroshima, Japanio:**

## **Mesaĝo por Internacia Virina Tago 2010**

Karaj virinoj - kaj viroj - en la mondo,

Nome de kunveno en Hiroshima por la Internacia Virina Tago 2010 ni sendas al vi elkoran saluton de amikeco. Ni plenuma komitato konsistas el 19 organizoj kiuj ĉiutage aktivas en diversaj medioj por egalrajtoj inter viroj kaj virinoj, altigo de virina posteno en la socio, konstruo de la socio de komuna partopreno de gevoj, kaj paco.

**Ni havos kunvenon por la Internacia Virina Tago en la 8a, marto, 2010.**

Nun internacie leviĝas altaj ondoj por "la mondo sen nuklearmiloj" kordezirata de ni en Hiroshima okaze de enoficiĝo de s-ro Obama kiel usona prezidento, kaj la ŝanĝo de japana registaro. Sed, samtempe kreskas pli da danĝeroj, dislokiĝoj de nuklearmiloj kaj ties ebloj de uzado, kaj riskas Pakton de Ne-disvastigo de Nukleaj armiloj (NPT), solan internacian kanalon klopodi al redukto de nuklearmiloj. Nun ni staras ĉe vojkrucio por grava elekto cele al realigo de paca la mondo.

La 6an de aŭgusto, 2009, la urbestro de Hiroshima en sia Paca Deklaro apelis "Perspektivon 2020" realigi nuligon de nuklearmiloj ĝis la jaro 2020, kordeziron de hibakshoj "Neniu aliaj havu vivon de atombombitoj." La Monda Konferenco de Urbestroj al Paco, al kiu pli ol 3000 urboj apartenas el tuta mondo, klopodas por ke la kunveno de reekzameno de NPT adoptu en la jaro 2010 la Protokolon de Hiroshima-Nagasaki, kiu konkretigas la "Perspektivon 2020." Ni el Hiroshima responde al ĝi luktas levi ondojn de internaciaj voĉoj realigi nuligon de nuklearmilojn sur la tero.

**Ni petas vin bonvole doni vian mesaĝon, kiun ni en la kunveno de la Virina Tago ekspozicios, kaj kune kun voĉoj el Hiroshima portos al la kunveno de reekzameno de Pakto de Ne-disvastigo de Nukleaj armiloj en majo, 2010, en Novjorko, Usono.**

S-ino ABE Kyoko, Prez. de la plenuma komitato.  
Plenuma Komitato por Internacia Virina Tago 2010,  
kaj Municipo Hiroshima

Kun guberniaj kaj urbaj organizoj:  
Arko de Hiroshima/ Ligo de WE-palaco/ Kina karavano/  
Novjapana virina asocio/ Tutlanda ligo de vartistoj/  
Hiroshima Esperanto-Centro/ Ligo de medicinaj sindikatoj/  
Emerita sindikato/ Instruista laborsindikato/  
Ligo de solaj patrino k infano (gubernia kaj urba)/  
Laborsindikato de municipaj oficistoj/  
Laborsindikato de urbaj oficistoj/ Ligo de patrinoj/  
Ligo de lokaj virinaj asocioj de Hiroshima/  
Ligo de virinaj asocioj WE-Net/ Ligo de komercistoj/  
Virina demokrata klubo/ YMCA.

Kontaktoadreso: OSIOKA Taeko [osioka@mail.goo.ne.jp](mailto:osioka@mail.goo.ne.jp)

Oogonzantyo 7-15, Minami-ku, Hiroshima,  
734-0041 Japanio

**Limdato kaj aliaj: ĝis la 20a de febr. 2010.**

**Maksimume sur unu leterpapero. Ankaŭ viroj rajtas skribi al ni. Nome de organizo tre bonvenaj.**

**Notoj petataj: nomo, aĝo se eble, profesio, loĝloko (urbonomo)**

# Skizo pri la Esperanto-movado

La **Esperanto-movado** estas [movado](#) por disvastigi [esperanton](#) en la tuta mondo. La tradicia celo estas la [fina venko](#), do la stato, ke ĉiu homo parolu Esperanton kiel sian duan lingvon por povi interkompreniĝi kun ĉiu alia. Estas multaj diversaj kialoj, pro kiuj oni provas disvastigi ĝin. Kelkaj faras tion, ĉar ili volas [mondan pacon](#), aliaj simple volas komuniki kun homoj tra la tuta mondo, pliaj por organizi mondscale la [laboristan lukton](#) kaj iuj faras ĝin batalante por [lingva egaleco](#). Kelkaj ankaŭ subtenas la disvastigon de Esperanto pro la ŝparado rilate al fremdlingva lernado, tradukado ks.

## Movado kaj komunumo

Tradicie en la Esperanto-asocioj per la nomo 'Esperanto-movado' oni nomas ĉion, kio rilatas al Esperanto. Ekde la sepdekaj jaroj de la 20a jarcento sociologoj pli kaj pli atentigas, ke la aktuala Esperanto-fenomeno ne plu estas "movado" en la kutima senco; ĝi ne plu havas ĉefan karakteron kompareblan kun ekzemple la pac-movado aŭ la feminisma movado, kie la antaŭenigo de la celo estas la ĉefa okupo de la partoprenantaj homoj.

El la origina 'Esperanto-movado' por disvastigi Esperanton fariĝis en la daŭro de la jardekoj '[Esperanto-komunumo](#)', kiu ĉefe aplikas Esperanton. Multaj komunumanoj ne plu okupiĝas pri la disvastigo de Esperanto, sed nur uzas la lingvon en diversaj manieroj. Sekve multaj homoj hodiaŭ ŝatas distingon inter 'movado' (do la Esperanto-organizoj kun la klopodado disvastigi Esperanton) kaj 'komunumo' (la Esperanto-parolantoj, la renkontiĝoj, la [eldonejoj](#), la [muzika kulturo](#), [Pasporta Servo](#), Vikipedio ktp.).

## La movadaj asocioj

### Iom da historio

Dek jarojn post la lanĉo de esperanto, ekzistis en la tuta mondo ses Esperantistaj kluboj: Nurenbergo, Petrograd, Odeso, Uppsala kaj Louhan (en Francujo) estis la unuaj. En 1898 fondiĝis en Francujo la **Société pour la propagation de l'Espéranto (SPPE)**, kiu en 1903 ŝanĝis sian nomon al Société française pour la propagation de l'Espéranto (SFPE). Post la unua kongreso en Bulonjo-ĉe-Mar (1905) kaj la Ido-krizo (1906), estis fondita de Hector Hodler la unua vere internacia organizo: universala esperanto-asocio (UEA). Post la unua mondmilito, la movado reorganizis, kaj laboristaj esperantistoj kreis sian apartan asocion, kun la celo meti esperanton je la servo de la internacia laborista klaso. Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) fondiĝis en Prago en 1921. Tiuj asocioj, plurfoje reformitaj, ankoraŭ ekzistas nun.

### Nuna strukturo

En la Esperanto-movado troviĝas mondskalaj [asocioj](#) kiaj **Universala Esperanto Asocio** (UEA), **Tutmonda Esperanto Junulara Organizo** (TEJO), **Sennacieca Asocio Tutmonda** (SAT), **Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj** (ILEI) ... Iom alimaniere funkcias du asocioj: **Monda Asembleo Socia (MAS)** estas tutmonda organizo, fondita en 2005, laboras ekskluzive per interreto, havas nek estraron nek plenumkomitaton, kaj celas agi por mond-paco kaj pli justa mondo. Ĝia agado estas ĉefe eldona (rete kaj libroforme). La Esperanta Civito, fondita en 2001, celas esti subjekto de internacia juro, kun federisma strukturo kun celo reprezenti la [Esperantio](#)-anaron (esperanto-landon).

La asocioj ofte havas **landajn sekciojn**, por labori naciskale al la ĝenerala celo. Ekzemple UEA havas sekcion en Francujo, kiu nomiĝas Esperanto-France. Same havas TEJO sian

sekcion (JEFO), kaj ILEI : Groupe des Enseignants Espérantistes (GEE).

SAT estas aparta, ĉar ĝi ne celas kiel la aliaj disvastigi la lingvon esperanto, sed uzi ĝin por la celoj de la tutmonda laborista klaso. Estante nur asocio de individuoj, ĝi ne havas landajn sekciojn, sed kunlaborantajn organizaĵojn, kiuj strukturiĝas laŭ la parolataj lingvoj. En Francujo, SAT-amikaro estas asocio, kiu en la franclingvaj landoj « celas konigi esperanton aparte al personoj, por kiuj tiu lingvo havas unuarangan utilon, socian, pedagogian, kulturan, kaj praktikan. Ĝi ankaŭ celas varbi por la internacia asocio SAT » (1).

En Francujo oni observas do, ke du asocioj havas saman celon « konigi esperanton ».

Paralele, ekzistas granda kvanto de « **fakaj asocioj** », kiuj ligas homojn de la sama fako. Ekzemple Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) aŭ Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF), se citi nur la plej malnovajn, fonditajn respektive en 1908 kaj 1909.

### **Kaj en Midi-Pyrénées?**

Kiel statas sur la loka kaj regiona niveloj ?

Kursoj kaj lokaj kluboj organizatas en urboj aŭ vilaĝoj, kie esperantistoj kutime senĝene kunlaboras. Je tiu nivelo, multaj eĉ ne scias, kiel kaj el kie venas la belaj afiŝoj kaj flugfolioj, aŭ lernolibroj uzataj.

En multaj francaj regionoj la kluboj ligiĝas en regiona federacio (Ekz la bretona esperanto-federacio havas 25 funkciantajn klubojn), kaj la plej multaj el tiuj regionaj asocioj ligiĝis per kontrakto kun Esperanto-France. Tio signifas reciprokan informadon, kaj komunan uzon (*mutualisation*) de rimedoj. En nia regiono, Esperanto Midi-Pyrénées estas tia asocio, kiu arigas esperantistojn el diversaj tendencoj (aŭ sen) por labori kune al komuna celo. Al EMP apartenas du lokaj kluboj (Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo, kaj Cercle d'Etudes Espérantistes d'Ariège (CEEAA)), kaj individuoj el aliaj departementoj.

Esperante, ke tiu skizo klarigos, kaj helpas ĉefe la novajn esperantoparolantojn orientiĝi en tiu Movado, mi bonvenigas viajn komentojn.

Jeannette Cash

Fonto : Wikipedia

---

(1) Laŭ ĝia retejo <<http://esperanto-sat.info/article344.html>>, « Sat-amikaro a pour objectif de mettre l'espéranto plus particulièrement au service des personnes pour lesquelles cette langue présente en premier lieu un intérêt d'ordre social, pédagogique, culturel et pratique ». Laŭ ĝia statuto tamen, la celoj estas : « a) de propager et d'enseigner la langue universelle ESPERANTO dans les milieux d'avant-garde, b) de recruter des membres pour Sennacieca Asocio Tutmonda (Association Mondiale des Travailleurs Espérantistes)

=====

## **APPRENDRE L'ESPERANTO en mars**

**Mediterranea Esperanto Semajno : 27 février au 06 mars 2010 - AGAY** (près de Saint-Raphaël)

Pour cette Semaine d'Espéranto Méditerranéenne: Trois niveaux de cours dispensés par des professeurs étrangers expérimentés, le 1er niveau par l'espagnol Rafael Mateos, le 2° niveau par le Britannique Malcolm Jones pour un cours de conversation, et le 3° niveau avec le polonais Waldemar Lipowicz pour un séminaire sur l'écriture de nouvelles

**Contact:** Monique Prezioso prezmoni@hotmail.com , lprez@voila.fr , kris\_grai@hotmail.fr

**Week-ends à Arrout : Découverte (et pratique) de l'espéranto: 6 et 7 MARS 2010**

10 h de cours, du samedi 10 h au dim.17 h.

Niveaux: Débutant et Conversation

Hébergement en chambres de 3 et 6 lits.

**Contact :** Marion 0687647584 /[esperanto.toulouse@free.fr](mailto:esperanto.toulouse@free.fr)- <http://esperanto.toulouse.free.fr>

VILLENEUVE D'AVEYRON  
**CONFÉRENCE DÉBAT SUR LE JAPON**  
en espéranto avec interprétation en français  
par André Andrieu

**HORI Yasuo**

Membre du bureau de l'Universala Esperanto Asocio  
accompagné de ARAI Toshinobu



Les instruments de musique du monde.  
Relations historiques entre la France et le Japon.  
La calligraphie - La hiérorithérapie - L'origami.  
Les chants et danses du Japon.  
Les gestes et les jeux de doigts.

Office de tourisme - Salle du Patrimoine  
le mercredi 27 janvier 2010 à 20 h 30

Libre participation aux frais